BRITA ESPERANTO-HUMANISTARO

Sekretario G Dickinson 21 Gribble Rd Liverpool 10
Anglujo
21.5.58

Kara Amiko.

Multajn dankojn pro Via letero
Ĝi estas unu el la plej gravaj leteroj, kiujn
mi iam ricevis.
La kunveno en Mainz donas al ni la oportunon
konatiĝi. Tiuj reprezentantoj de Humanistoj
kaj similaj organizajoj (kiel ni) kiuj ne povos
ĉeesti en Mainz povas sendi salut leterojn
La rimarkojn kiujn Vi faras pri la inter
konatiĝo estas pravaj. Mainz estu por ni
oportuno. Mi dankas al Vi pro la diversaj
adresoj. Mi provos kontakti ilin kun
salut leteroj.
Mi sendas Vian leteron al nia fondinto
Sro. J Leslie 140 Holland Park Avenue
London W 11. Li estas sekretario de
Brita Esperantista Asocio kaj bona amiko
de Sro Weichmann en Dortmund.
Mi esperas, ke Vi povas sendi al ni plurajn
detalojn pri la organizaĵo internacia.
Unu el la manieroj laŭ kiu ni povus fondi
kaj fortiki la movadon estas per filiiĝo
Movadoj povas filiiĝi unu al la alia kaj per
inter ŝanĝo de adresoj

709.752-C.Esp.M.
6
Österreichische Nationalbibliothek
Digitale Services

kaj interkorespondado ni povos fari
decidojn internaciajn
Mi sendas al Vi amikajn salutojn kaj koran
dankon por Via letero; ankaŭ multajn
gratulojn pro Via sukceso ĉe Mainz
Espereble ni povos aperigi la
anoncon pri la kunveno en
British Esperantist
Poste ni sendos al Vi oficialan salut-
leteron por la kunveno

Sincere
J. Dickinson.

ÖSTERREICHISCHE
NATIONALBIBLIOTHEK
709.752-C
ESP. M. 6